
V-19563/1974



# LA SKOLTA MONDO

Volumo 4 Numero 22
Dua Jarkvarono 1974

V-19563/1974

# S ☆ E ☆ L

Fondinto: "Avoto".
Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:
Avoto, Norman Booth, D.H. Davis, L.J. Van Gulck.

Prezidanto: John Berggreen, Brattvollveien 23 c, Oslo 11 Norvegujo.

Sekretario: J. K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando. Poŝtkto 632246

Kasisto kaj Administranto de "La Skolta Mondo":
David H. Withey, 21. Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool L 22 3YE, Britujo Telefono WAT 2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach, Nergata 37c, N-6500 Kristiansund N, Norvegujo.

Membroj de Centra Komitato:
Seppo Tella, 9kp, SF-55950 Imatra 95, Finnlando

Ŝindo-Seitaro, Nisi-mikuni 1-tyôme 200, Higasi-yodogawaku, Osaka-si, Japanujo.

La Skolta Mondo aperas kvarfoje en la jaro.
Okaze de nericevo, bonvolu sciigi Nacian Reprezentanton aŭ la Administranton.

# jam



pasis la 10 unuaj jaroj de mia redaktoreco. Antaŭ mi kuŝas 40 n-roj de La Skolta Mondo el mia mano.
Tempo venis al pripenso, ĉu oni devas serĉi novan viron kun novaj ideoj, por ke nia gazeto fariĝu nur spegulo de unu viro. Ne miskomprenu: Mi ne forlasos la seĝon de la redaktoro nun tuj, sed mi ankaŭ nek povas nek volas promesi resti poreterne.
Tempo ankaŭ venis por rigardi ĉu mi sukcesis aŭ malsukcesis. Kompreneble mi ne mem povas juĝi je tio - vi, la legantoj - estas la korto. Sed iom mi ja scias.

Mi ricevis laŭdon - kaj tio estas instigilo al novaj provoj kaj al nova laboro. Mi ricevis kritikon kaj konsilojn. Tio estas des pli valora, ĉar ĝi helpas al pliriĉigo kaj vario, se la kritiko nur estas konstruktiva.

Mi do iel povas diri, ke mi havis sukceson, kaj estas kontenta. Se mi reiras al mia unua numero, mi tamen trovas en ĝi programon kiun mi ne realigis.

Mia revo, mia celo, estis krei el nia modesta revuo spegulon de la Skolta Mondo. Tio estus eble, se la legantoj sendus al mi, al la redakcio, malnovajn numerojn de naciaj skoltaj revuoj. Mi povus senpere tralegi angla-, germana- kaj franca-lingvajn, kvankam al la lastaj mi bezonus tempon kaj energion. Mi povus havi ideon pri la enhavo de kelkaj aliaj. Kaj mi povus uzi materialon el ĉio.

Sed la materialo ne alvenis. Mi nun demandas: Kial? Ĉu ankaŭ ne al la ekspozicio dum Nordjamb 75 la materialo ne alvenos? Simple ĉar neniu legas nian revuon? Tio estas mia malsukceso - ĉu L.S.M. estas legata aŭ ne, ke la intenco krei el ĝi internacian spegulon, fiaskis.

Tamen mi sidas sur la redaktora seĝo kun kontento kaj ĝojo, ĉar mia konscienco diras al mi, ke mi faris mian plejbonon, kaj ĉar la laboro donis al mi kaj geamikojn kaj bonajn kunlaborantojn.

La 40 numeroj montras ian progreson. Sed multo estas farenda kaj farinda. Tial mi denove esprimas la saman deziron: Ke la legantoj alsendu materialon: skoltaj revuoj el kiuj mi povas tondi, sciigojn, fotojn, skoltajn kantojn, muziknotojn, ideojn pri ludoj - jes, ĉio ajn por La Skolta Mondo

Via

Hans Amund

# Jarraporto por 1973

Anstataŭ atenti pri la multaj etaj sukcesoj dum 1973, ni objektive konstatu, ke entute la jaro estis tro trankvila, kompare kun niaj planoj kaj ideoj.

En BREGENZ (Aŭstrujo) okazis SEL-kunveno 3.-13. de Julio. La ĉeestantoj havis tre bonan tempon, kaj pro la kunveno la aktiveco de SEL en Aŭstrujo povis rekomenci kun bonaj eblecoj pri sukceso. Sed la nombro de partoprenantoj, 14, el kiuj 6 el unu familio, estis ĉagrenige malgranda.

Dum la UNIVERSALA KONGRESO preskaŭ 30 amikoj de SEL kunvenis. Ili povis doni tre utilajn konsilojn kaj informojn al la CK.

La ĴAMBOREO-PER-RADIO, 20. kaj 21 de Oktobro, estis tre malsukcesa. Post tri jaroj de vanaj klopodoj ni atingis kontakton kun ILERA, la asocio de radio-amatoroj, kaj invitis 35 membrojn al kunlaboro. 5 volis kaj povis helpi. Sed precize en tiuj lokoj la skoltoj ne montris intereson al partopreno.

La klopodoj starigi samspecan interrilaton kun la asocio de SONBENDAMIKOJ tute fiaskis, ĉar tiu fakorganizo tute ne respondis al leteroj.

La GAZETARO nur malmulte helpis diskonigi niajn planojn kaj instigi al kunlaboro. Kredeble multaj esperantistoj opinias nin mortintaj.
La gazetoj preferas ekskluzivajn artikolojn, sed verkado por ĉiu gazeto aparte estas tro temporaba por sola helpanto. Sed eĉ kiam ni sukcesis en tio, oni nur hezite helpis. Relative bona escepto estis "Heroldo". Neniu gazeto el propra initiativo publikigis ion.

KUNLABORIS kun ni preskaŭ nur privataj personoj. La organizita Esperantomovado ĝenerale ne donis efektivan helpon. Nur la naciaj asocioj de Aŭstralujo, Italujo kaj Svedujo klopodis helpi nin.

La INSTITUCIO HODLER donacis al ni 500 ned. gld., kiujn ni metis en la speciala kaso, kiu enhavas la enspezojn pro la vendo de la lernolibro, el kiu ni pagas preskaŭ ĉiujn propagandajn laborojn. Tiu donaco estis por ni honorigo kaj kuraĝigilo!

La rilatoj kun la SKOLTA MONDA OFICEJO pliboniĝis. En programo por pli vasta internacia kunlaboro oni menciis nian lingvon kaj nian adreson.

En tiu SKOLTA INTERLIGA PROGRAMO ni kiel eble plej multe kunlaboris klopodante starigi internaciajn kontaktojn inter skoltgrupoj surbaze de Esperanto. Nia NR por Irlando, Frank Dobbs, libervolis fari la administradon, kaj povis noti intereson el Aŭstrujo, Irlando kaj Portugalujo.

La PAUL BLAISE FONDUSO ricevis donacon okaze de la kunveno en Bregenz.

La preparoj por la ĴAMBOREO EN NORVEGUJO estis daŭrigataj, tiel ke ni nun havas klaran bildon de niaj agadoj kaj eblecoj dum la ĵamboreo. Nordlandaj amikoj starigis rilatojn inter SEL kaj la skandinaviaj esperantoasocioj kaj ni estas kontentaj pri la progreso kiun ni faris.

La CENTRA KOMITATO pligrandiĝis per Seppo Tella, Finnlando, kaj Seitaro Ŝindo, Japanujo.

LA SKOLTA MONDO regule aperis en agrabla aspekto kaj kun interesiga enhavo, pri kiuj ni regule ricevis laŭdon. Ni ne povis rimarkeble altigi la nombron de abonantoj, kaj nova porjunulara gazeto "Juna Amiko" aperis. Ni esperas, ke ĝi ne plimalbonigos la situacion por LSM, kiu estas jam sufiĉe malfacila.


La RETO DE NACIAJ REPREZENTANTOJ kaj la sendependaj naciaj sekcioj necesas. Tamen ĝi denove montriĝis zorgodona. Ni povis aldoni nur du landojn: Germanujo kaj Aŭstrujo. Vane ni klopodis en aliaj landoj, kvankam ni en Svislando ricevis multan apogon. En Svedujo ni ricevis la helpon de peranto.

La kvalito de la diversaj naciaj sekcioj tute dependas de la laboreblecoj de la Naciaj Reprezentantoj, kiuj kompreneble estas limigitaj kaj foje eĉ preskaŭ tute mankas. Ni instigis al tiuj dividi la taskojn, serĉi kunlaborantojn kaj se necese jam instrui eventualajn anstataŭantojn, sed montriĝis, ke ili plej multe ŝatas konservi la taskon al si mem, tiel donante malprofiton al nia Ligo kelkfoje.
En Aŭstralujo la serco al helpantoj malsukcesis ĝis nun, kaj nur en Nederlando ĝi sukcesis.
Denove, por la kvara fojo en mallonga tempo, ni devas dubi pri la kunlaboro de la NR en Usono, ĉar ankaŭ la nuna ĝis nun ne tre emis respondi al leteroj de la Centra Komitato kaj aliaj personoj. Iom hontiga afero por tia grandega lando.
La MEMBRO-NOMBRO malfeliĉe ne kreskis rimarkeble, kaj do ankaŭ ne la enspezoj. Se ne venos rezultoj de nia laboro ankaŭ sur tiu tereno, la situacio certe malfaciliĝos por nia kaso!
KONKLUDO.
Kvankam estas malfacile paroli pri progreso, ni certe ne povas konstati malprogreson.
El la pasinta jaro ni ĉerpis la instigon daŭrigi nian vojon en la nuna direkto, sed ni ankaŭ lernis, ke ni devos fari nian laboron per propraj fortoj, sen atendi helpon de aliuloj!
Ni estas feliĉaj, ke ni povas kalkuli pri aro de bonvolaj kaj aktivaj helpantoj, malgraŭ la fakto, ke tiu aro estas tro malgranda por la multa grava, farenda laboro.

Anonco.
Priskribu iun tre interesan aventuron de via vivo, sendu al mi la poeziaĵon aŭ rakonteton kiu vin plej impresis. Limdato 15.12.1974. Ĉiu ricevos respondon kaj malgrandan donaceton. Mia adreso: Andreo Marszatkowski, poŝtfako 254, Pl 80-958 Gdansk 1, Pollando.

★

34 skoltetoj
(7-11 jaraj, do lupidoj, volas korespondi kun estr(in)oj kaj lupidoj de diversaj partoj de la mondo, kaj interŝanĝi spertojn, skoltajn insignojn, poŝtmarkojn k.t.p.
Skribu al la Akela, la 22-jara instruistino Anna Rita Perini, Via Buozzi 40, I-47023 Cesena, Italujo.




Okaze de la granda turisma movado al Romo antaŭvidita por la sankta jaro 1974-1975, la provinca turisma organizaĵo de Romo (E.P.T.) sin deklaris preta republikigi bildajn broŝurojn pri romaj monumentoj kaj vidindaĵoj en esperanto, kondiĉe ke ĝi konstatu pro la nombro da petoj, la utilon kaj la oportunon de tialingva broŝurpresado.

Sekve ĉiuj interesatoj, personoj kaj grupoj, estas konsilataj peti senprokraste esperantlingvajn broŝurojn skribante al: E.P.T., via Parigi n. 1, 00187 Roma, Italujo.

**SKOLTA SCIENCO**

# La tero malpuriĝas!

Minerala oleo, kiun ni uzas por niaj motoroj kaj aŭtomobiloj, kaj por la hejtado de niaj domoj, estas danĝera por la naturo.

La grundo en kiun la oleo venis, estas malbona por la plantoj, La subtera akvo, kiun ni ofte bezonas , por fari el ĝi trink-akvon povas esti netrinkebla pro la malpuriĝado.

Kiel oleo povas veni en la akvon kaj la teron ? Ne nur pro akcidentoj, kun tank-aŭtoj kaj tankŝipoj.

Ofte ĝi venas en teron kaj grundon ne-rimarkite: ĝi gutumas el aŭtomobiloj, el motoroj kaj ankaŭ el flugmaŝinoj. Eble en ia subtera reservejo estas malgranda trueto, el kiu la oleo likas (perdiĝas) sen ke ni tion rimarkas. Inter la oleo-puto, kaj la uzo de la oleo en motoro, tiel jam 5% povas perdiĝi !

Kaj eĉ intence la homo malpurigas la teron, kiam li metas novan oleon en sian aŭtomobilon, kaj simple forĵetas la el-uzitan oleon sur kampon aŭ en kanalon !

Ni faros kelkajn eksperimentojn pri la danĝeroj de oleo.

<u>Eksperimento 1</u>


Prenu notlibron kaj iru sur la straton.

Notu kiom ofte vi vidas ian malpuriĝadon pro oleo, ĉu akci--dente, ĉu intence.

Ne forgesu kontroli vian propran domon kaj familion kaj : vin mem !

Pripensu kion vi povus fa--ri por plibonigi la situacion !

<u>La foto</u> -->




La oleo likas el la 4500 oleo-pumpiloj en la Lago de Marakaibo, Venezuelo.


Ankaŭ la akvo-plantoj forte kreskas pro la forĵetaĵoj de la urboj ĉe la bordo. Tiuj estas tre fekundaj por tiuj plantoj .

Pro tiuj du kialoj la Lago tute malpuriĝos.

Nun la registaro severe kontrolas la malpurigon.

Foto FAO,/World Scouting.




Eksperimento 2.

Ni kontrolos, kiom malmulte da oleo povas malpurigi grandegan kvanton da akvo. Estas necesa miksi unu parton da oleo en mil partojn de pura akvo. Kiel fari tion ? Tio estas iom malfacila tasko, kiam taŭgaj mezuriloj mankas al ni, sed ni tamen klopodos !

Prenu botelon kun akvo, kaj dividu la enhavon kiel eble plej bone je dek glasoj. Nun vi povos uzi unu glason kiel mezurilon: ĝi ja rakontas al vi kiom estas dek-ono de la botelo !

Prenu sitelon. Metu en ĝin : unu glason da minerala oleo, ĉu de aŭtomobilo, ĉu de motoro aŭ hejtiga forno, kaj dek botelojn da pura akvo.

Do : 0.1 botelo da oleo kun 10 boteloj da akvo.
Kioma parto de la enhavo nun estas oleo ? Jes, cent-ono !

Bone kirlu la enhavon, kaj provu, ĉu vi povas trinki ĝin !Ĉu ĝi estas bongusta ? Kiel ĝi odoras ? Malbone,ĉu ne ?

Eksperimento 3.

Unu glaso de nia miksaĵo, kun plena botelo da akvo, donas ian miksaĵon, de kiu milona parto estas el oleo.

Unu glaso, kun dek boteloj...jes, tion vi mem kalkulu !
Provu denove la miksaĵojn laŭ gusto kaj odoro !

Ripetu la aldonon de akvo al via miksaĵo ankoraŭ kelkajn fojojn: ĉiam denove unu glason - kun 1 aŭ kun 10 boteloj, ĉiam metu ilin en puran sitelon, kaj ĉiam bone kirlu !

Kontrolu kun viaj amikoj ĝis kiam vi povas flari kaj gustumi la oleon !

Ĉu iliaj nazoj kaj langoj estas de la sama kvalito ?

Ĉu ĉiuj specoj de oleo estas same malagrablaj kaj danĝeraj ?

Povas okazi, ke unu parto da oleo malpurigas 1000.000 partojn da akvo !

Eksperimento 4.

Oleo penetras en la teron. Se pluvas, la pluvo-akvo trans - portas la oleon malsupren, kaj tiel la oleo malpurigas la sub-- teran akvon, kiun ni ofte uzas por trinki. Ni kontrolos tion.

En filtrilon ni metu kvanton da grundo. Faru kelkajn eksperimentojn kun diversaj specoj de grundo : sablo, argilo, ĝardena grundo k.t.p. Verŝu sur ĝin unu kubikan centimetron da oleo. Nun verŝu puran akvon tra la filtrilon. Kontrolu la akvon, kiu sube venas el la filtrilo !

Kial vi protestas ? Ĉu vi ne povas fari la eksperimenton , ĉar vi ne havas filtrilon ?

Vi pravas, sed mi scias solvon ! Prenu botelon el plasto , kaj per tranĉilo aŭ tondilo forigu la fundon el ĝi. Metu ĝin,la kolo malsupre, sur vitra poto. Kovru la truon per tavoleto de vatoj el la unua-help-kesto, kaj pecon de tolo, kaj enmetu la grundon !

Demando: ĉu tuj eliras malpuran akvon ? Kial la unua akvo, kiu eliras estas pura ?

Ĉu estas diferencoj inter la diversaj specoj de oleo, kaj de grundo ? Notu la diferencojn !

Eksperimento 5.




Povas okazi, ke la malpurigado de la tero jam baldaŭ estas rimarkebla en la trink-akvo, sed ankaŭ povas okazi, ke tio daŭras tre longe.

Kelkaj specoj de grundo permesas al la oleo trairi tre rapide, aliaj specoj 'retenas' , 'bremsas' la tra-iron.

Pretigu kelkajn filtrilojn kaj verŝu en ĉiun, iom post iom, glason da oleo.

Notu:

Post kiom da tempo la oleo komencas eliri sube ? Kiom pasis tra la filtrilo post duona horo ? Post unu, du tri horoj ? Kaj post plena tago ? Ĉu la tuta kvanto tra-iris, aŭ ĉu iom da oleo restas en la filtrilo ? Kiom ?

Rimarko.

Vi laboru kiel eble plej bone. Eksperimento devas estu farita 'honeste'. Tial : uzu, kiel eble plej multe similajn fil--trilojn, kaj la samajn kvantojn da grundo kaj oleo !

Eksperimento 6.

Kiel oleo efikas je la kresko de plantoj ? Por eltrovi tion, vi povus fari novan eksperimenton.

Vi bezonas, krom tempon, semojn, grundon, kaj kelkajn malgrandajn kestojn. Se vi ne havas semojn, prenu pizojn, ankaŭ ili ja estas semoj !


Preparu du kestojn kun grundo, unu kun pura, la alia kom--preneble kun malpura grundo. Metu en ĉiun keston 5, 10 aŭ eĉ 20 semojn. Prizorgu la semojn kiel eble plej bone, kaj komparu, ĉu estas diferenco inter la kestoj !

Sed nun unue respondu la demandojn :
1. Kial vi devas uzi du kestojn ? 2. Kial vi devas zorgi ke la du kestoj estu kiel eble plej similaj ? 3. Kial poto kun nur 1, 2 semoj ne taŭgas ? 4. Ĉu estas necese meti la du kestojn tute apude, aŭ ĉu estas bone, kiam vi prizorgas unu keston kaj via amiko en sia domo la alian ?

Faru post iom da tempo listojn, unu por ĉiu kesto, en kiuj vi notas : kiom da plantoj estas bonaj kaj fortaj, kiom malpli bonaj, kiom vere malbonaj... kaj kiom da plantoj tute ne aperis.

Kiam vi faras eksperimenton, ĉiam bone notu, kion vi faris! Kaj nun : ek, al la laboro !

Respondoj.



1. Vi bezonas unu keston por kompari ĝin , kun la dua.
Kiam la semoj ne kreskas, ja ankaŭ povas esti, ĉar la semoj ne taŭgas, aŭ ĉar vi ne bone prizorgis ilin !
2. Por honesta eksperi-- mento tio estas necesa. Se unu kesto estas profunda, kaj la alia kesto estas malprofunda, tiam la difenrenco povas esti pro tio, kaj ne pro la oleo !
3. Nun vi evitas ke vi hazarde prenis kelkajn malbonajn semojn. Se vi prenas nur unu semon, ĝi povas esti ĉu bona, ĉu malbona . Se vi prenas kelkdek semojn, inter tiuj certe estos kaj bonaj , kaj malbonaj semoj. Tial via eksperimento estos pli honesta !
4. Mi esperas ke vi tion komprenas sen klarigo. Se ne, mi tre , tre bedaŭras, sed mi dubas ĉu vi povas fari bonajn eksperimentojn. Vi nepre re-legu kion mi diris pri honestaj eksperimentoj!

Eksperimento 7.

Oceanografoj estas homoj kiuj pristudas la oceanojn kaj la marojn.

Ili diras ke jam en 1970 sur ĉiuj maroj estis tavoleto de oleo, je dikeco de 3 molekuloj. Maldika, tamen sufiĉe por pre-- venti la vaporiĝon de la akvo.

Feliĉe la vento kaj la ondoj regule rompas la tavoleton ! Kiam oleo malhelpas la vaporiĝon, malpli da akvo venas en la atmosfero, kaj malpli ofte pluvos. La klimato estas pli seka , kaj pro tio kelkloke eĉ malsato povus okazi ! !

Prenu du pelvojn kun akvo, kaj metu guton de oleo en unu el ili. Metu ilin en loko, kie vento kaj suno povas atingi ilin. Komparu kiom rapide la akvo malaperas en ĉiu pelvo !

## Kelkaj malfacilaj vortoj el la ekologio.

Regeneri - Fari novajn krud-materialojn el uzitaj objektoj, kaj el forĵetaĵoj. Ekzemple: fari novan paperon ne el ligno, sed el malnova, jam uzita papero. Fari novan ŝtalon el uzitaj aŭto-- mobiloj.

Genetiko - La studo, kiel idoj ricevas la ecojn de la gepatroj.Tio estas tre grava ĉar atom-eksplodoj povas influi tion. Kiam la gepatroj spertis radio-aktivecon la infanoj povos esti tre malsanaj, kvazaŭ monstroj...se idoj venos, ĉar eĉ tio ne estas certa!

Genetika diverseco, Leĝo pri la. - La leĝo diras ke ekosistemo, en kiu kelkaj specoj de plantoj aŭ bestoj mankas, estas pli malforta. Tial ni ankaŭ devas protekti la bestojn kaj plantojn , kiuj estas ne-belaj aŭ ne-utilaj, simple ĉar ili estas necesaj por la aliaj plantoj kaj bestoj .

# Diverse

GEEDZIĜO:
La nederlanda NR edziĝis al japana fraŭlino Takako Mimura. Nian koran gratulon!

NOVA NACIA REPREZENTANTO:
En la granda kaj grava lando Francujo ĝis nun mankis Nacia Reprezentanto. Nun sin anoncis:
s-ro Patrick Deveughele.
Bonvenon, amiko, al grava kaj ne facila laboro. Bonvenon al la rondo de Naciaj Reprezentantoj.




POŜTMARKOJ POR S.E.L.?
SMO kaj UEA petas al siaj membroj sendi al ili uzitajn postmarkojn, kiujn ili vendas favore al siaj kasoj. En 1971 UEA tielmaniere gajnis 30.000 gld. Ĉu SEL ne povus fari la samon? demandas nia JvG, kiu petas, ke membroj sendu iliajn uzitajn poŝtmarkojn al la sekretario, kasisto aŭ redaktoro unufoje en ĉiu jaro. Estus konsilinde, ke la sendontoj malgluu ilin mem. Tio ŝparus tempon kaj laboron al la ricevanto kaj ankaŭ farus la sendaĵon pli malkara. Sed oni devas fari tion kun zorgo, por ke la poŝtmarkoj ne difektiĝu, perdu "denton", perdu koloron k.t.p. Uzu puran akvon.

NEGES EWYLLYS DA IEUENCTID CYMRU AT IEUENCTID Y BYD AR DDYDD EWYLLYS DA - 18 MAI 1974.

La 53-a Bonvolmesaĝo de la Junularo de Kimrujo al la Junularo de la Mondo, je Bonvoltago 1974.

Je ĉi tiu Bonvoltago ni alvokas la junularon de ĉiuj landoj unuiĝi kun ni, por certigi por ĉiu homo sanan kaj abundan vivon.

Ni konstatas, ke multaj samtempuloj niaj vivas en sangomakulita kaj ĉagrenplena medio. Po ĉiu persono, kiu ĝuas nutroriĉajn manĝojn, dormas en komforta hejmo, kaj vekiĝas al abunda vivo, estas miloj kunjunuloj niaj, kiuj malsatas, senhejme kaj malriĉeĝe.

Multaj landoj ekspluatas la avantaĝojn de moderna teknologio, sed je alta kosto de malbeleco kaj malpureco. Ni, en Kimrujo, bone scias pri la malurigo de la aero kaj la riveroj, kaj pri la malbeligo de la kamparo pro ekonomia gajno.

Hodiaŭ ankaŭ ni havas revon - revon kiu antaŭvidas la tempon, kiam la sanuloj helpos la malsanulojn, la riĉuloj disdonas al la malriĉuloj, kaj la fortuloj subtenos la malfortulojn. Junularo de la mondo, ni taksu abnegacion pli alte ol avarecon. Ni respondu al la alvoko kaj dediĉu nin, entusiasme kaj energie, al la atingo de abunda vivo por la tuta homaro.

★

Skribu al: Sekr. Goodwill Message, Swyddfa'r Urdd, Aberystwyth, Wales, en Esperanto kaj substreku, ke vi legis la mesagon en La Skolta Mondo.

★★★

## Sendu skoltgazetojn tutmondajn al la C.K.!

*Geir Sverre Braut*

# *La Junipero*



Ĉu vi konas la juniperon? La latina nomo de ĉi tiu planto estas "Júniperus". En la tuta mondo estas 50 specioj de la genro Juniperus. Pli ofte la planto estas arbeto. Sed oni konas plantojn kiuj havas trunkojn pli ol 3 metroj cirkonference. La floroj estas pretaj en la aŭtuno. Tamen ili floras en la printempo venonta. La virfloroj disdonas grandajn nubojn de poleno. Se vi trairas arbaron de juniperoj, vi estos pleniĝota de flava pulvoro.

La beroj bezonas preskaŭ du jarojn por maturiĝi. La unua jaro ili estas .aj. En la dua ili estas preskaŭ nigraj. Ĉar la junipero bezonas tiel longan tempon, oni diras en Norvegujo:

Kiam ĉiu bero de junipero estas nigra,
ĉiuj knabinoj edziniĝos.

Por fumumi viandon, oni uzis la lignon de la planto. Kredeble ĉi tiu maniero estis elektita, ĉar oni kredis, ke la junipero forpelas la malbonajn spiritojn. Sed la fumo de junipero ankaŭ donas al la viando tre bonan guston. Oni ankaŭ uzus la planton por disŝuto sur la plankon antaŭ enterigoj. Ankaŭ tio ĉi estis farata por forpeli la malbonajn spiritojn.

Se du ciganoj geedziĝos, ili rondiras la juniperon je la sama vojo kiel la suno. Se ili eksedziĝu, ili rondiru kontraŭ-sune. Simple?


La junipero bezonas tre grandan lumkvanton. En la Alpoj oni trovas ĝin ĉe 3500 metroj. En Norvegujo ĝi estas trovebla ĝis 1700 metroj. La junipero kreskas sur la altaj, varmegaj rokoj de Kalifornio, kaj ĝi prosperas sur la montoj de Groenlando.

Geir Sverre Braut

# El Pollando

ni ricevis leteron pri konkreta kunlaboro: Interŝanĝado de Esp. libroj, de gramofondiskoj, de popolajn pupojn, kaj sur turisma medio. Por personoj kiuj venos kun prelegoj/diapozitivoj oni garantias loĝon kaj manĝojn.

Skribu al:
Polski Zwiazek Esperantystow,
Oddzial Wojewodzki w Gdansku,
Kolo nr 8 "Ĉe la maro",
80-389 Gdansk, ul Slaska 66 B,
Pollando.



El "World Scouting" ni prenis kelkajn bildojn pri ni kaj la naturo. Jen unu.

ESTU PRETA

NACIAJ REPREZENTANTOJ:

Australio: s-ro S.H.Milligan, 14 Kerry Close, Doncaster E 310g, Victoria

Austrujo: s-ro Franz Schwarzler, Rathausstrasse 2, 6900 Bregenz

Belgujo: s-ro Eddy Frederickx, Hennepstraat 10, B-2060 Merksem-Antwerpen. Postcekk 9978.93. Tel (03)4524.76

s-ro L.J.van Gulck: telefono (03)3688.08. Postkonto Belga Skolta Esperanto-Sekretariato 327460.

Brazilio: s-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante Tamarande 979, Belem, Para

Britujo: s-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Str., OL9 6AR Oldham, Lancs.

Danlando: s-ro A. Petersen, Blistrupsv 8, DK-2610 Rødovre. Tel 707157

Finnlando: s-ro Seppo Tella, 9 kp, SF-55950 Imatra 95, Tel 954-51130

Francujo: s-ro Patrick Deveughele, 53 Av. de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne.

Germanujo: s-ro Georg D Winkler, Haroldstrasse 47, D-41 Duisburg 1.

Hispanujo: s-ro Pedro Marqueta, F el Catolico 32, 5°izqda, Zaragoza. Telefono 252044.

Irlando: s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4

Italujo: s-ro prof. F Tulone, Via Frangipene 8, I-92019 Sciacca, Agrigento. Telefono 21.198.

Japanujo: s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K. 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.

Kanado: s-ro John H.F.Hoyle, Box 421, Forest Ont.

Helpa NR: s-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.

Nederlando: s-ro B.J.Wijmer, De Perponcherstr 118, Den Haag 2004. Tf 852359

s-ro J.K. Hammer: Tel: 02975-166931. Postkonto 632246.

Norvegujo: s-ro H.A.Rosbach, Nergt 37c, N-6500 Kristiansund. Tf 4773-77630. Postkonto 8030413.

s-ro J.Berggreen, Tel 472-283035, Postkonto 201621.

Novzelando: s-ro D.B.Pease, Flat 2, 8 Dent Street, Whangarei.

Portugalujo: s-ro J. de Matos Correia, Rua Cidade da Horta, Lote Q-5-3°, Pontinha, Lisboa 4.

Svedujo: Peranto: s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsgt 25, 11233 Stockholm

Usono: s-ro Ken Meyer, 1418 West Elm Street, Oxnard Cal. 93030.

Zairo: s-ro Paul Deloin Nzemba-Paku, B.P.280, Limete, Kinshasa.

Informoj pri membreco:
En landoj kun Nacia Sekcio: Informigu ce NR kaj pagu al li la landan kotizon.
Individuaj membroj (Nur en landoj sen N.R.!) Kotizo inkl. abono:
Junuloj gis 18 jaraj: Ned.gld. 3.30 au egalvaloro.
Pliaguloj: Ned.gld. 5.oo au egalvaloro.
Subtenantoj: Minimume Ned. gld. 5.oo au egalvaloro.



La foto kun moto "Aventuro nur ekzistas se oni mem kre
ĝin" gajnis la trofeon "Arco d' Oro 1973". Ĝin fotis
Giorgio Cocchi. La konkurso estas malferma al amatoroj.
Vidu "World Scouting" 2/1974 pri kondiĉoj.



# LA SKOLTA MONDO

Limtempo por manuskriptoj kaj anoncoj: 1-a de Februaro, Majo, Aŭgusto kaj de Novembro.



REDAKCIO: N-6500 KRISTIANSUND

KUL

NE ISSN 0037-6558